Heinrich Heine,

Libro de la kantoj, La reveno, I

tradukita de Manfred Retzlaff

Mian vivon igis hela
Dolĉa bildo per radi'
Nun la bildo paliĝintas.
En noktego estas mi.[2]

Kiam estas en malhelo,
La infano, timas ĝi;
Por forigi la premecon
Laŭte kantas tiu ĉi.

Infanece, ne tre plaĉe
Kantas mi en malhelec';
Sed la kanto liberigis
Min de mia kor-premec'.

Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Die Heimkehr, I" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984.*

Arg-714-1435 (2012-12-09 12:12:09)

[2] aŭ:
Mia viv', per dolĉa bildo
Lumigita estis ĝi.
Nun la bildo paliĝintas,
En noktego estas mi.